# Esperanto en Danio

25-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2018

104-a UNIVERSALA
KONGRESO de
ESPERANTO
LAHTIO–FINNLANDO
20–27 julio 2019

**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la prezidanto:**
Peter Wraae
Eremitageparken 17 st, C
2800 Lyngby
☎ 60 70 79 69 peter@wraae.dk

Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88 386

UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Finn Østerbæk (kasisto)
Ileana Schrøder (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Arne Casper

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45
finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.02.2019**

# Enhavo

**Eŭropa lingvotago......................3**
**Aperis nova lernolibro por junuloj en la dana......................4**

**Kopenhago......................5**
**Århus......................6**
**Ålborg......................6**
**Landa kunveno......................6**

**Esperanto estas sukceso ĉe Duolingo!......................7**
**Informado al tradukistoj......................7**
**Informado al medicinistoj......................8**
**Reklamu viajn aranĝojn!......................9**

**Se vi interesiĝas pri UEA ......................10**
**Lahtio 2019......................10**
**Progreso en Ĉinio......................13**
**50-jara jubileo de ESF......................13**

**Raportoj el Japanio......................15**

# Eŭropa lingvotago

Du semajnojn antaŭ la internacia lingva tago la 26-an de Septembro, nia prezidanto Peter Wraae ricevis inviton prezenti nian lingvon al parto de la studentoj en la kopenhaga komerca alternejo (CBS Niels Brock, en la centro). La lernejo donis la taskon organizi la tagon al la loka oficejo de la Eŭropa Unio, kiu havas vastan reton de spertaj homoj kiuj konas la plej grandajn lingvojn en Eŭropo.




La foto montras kiel la studentoj ricevis komunan enkondukon al la tago. Unue oni priparolis ĝeneralajn problemojn de tradukado kaj poste menciis ĉiujn prezentotajn lingvojn, inkluzive Esperanton.

Ĉiu lingvo havis propran ĉambron, kaj la studentoj restis po 20 minutojn en ĉiu ĉambro, kaj poste iris al alia. Peter prelegis al kvin klasoj kaj plaĉis al ili la logika gramatiko, la malvasta vortoprovizo kaj kompreneble Pasporta Servo. Peter informiĝis ke ili en malgrandaj grupoj antaŭ la Lingva Tago faris prezentadon al la samklasanoj pri la Eŭropaj lingvoj – ankaŭ pri Esperanto.

Post la klasoj la prezentintoj estis invititaj al lunĉo, kaj tie estis pluraj reprezentantoj de la aliaj lingvoj kiu estis tre scivolemaj pri Esperanto.

# Aperis nova lernolibro por junuloj en la dana

DEA ĵus eldonis novan lernolibron por junuloj kiun verkis Mia Nordentoft por DEJO nomitan *Moderne esperanto for begyndere – 100 jarojn post Zamĉjo*. La lernolibro enhavas abundajn ilustraĵojn kaj ekzemplojn por helpi al la leganto kompreni per pluraj periloj. Kun la lernolibro venas aparta libreto kun ekzercoj.




La celgrupo de la lernolibro estas junuloj kaj ĝuste pro tio la lernolibro multflanke estas kreita laŭ novstila perspektivo ĝuste por montri al ne-esperantistaj junuloj, ke Esperanto ne estas praaĵo kaj ke ĝi estas lerninda lingvo. Ĝi enkondukas la studanton al Esperanto de nulo kaj gvidas al nivelo de konversacia kapablo.

*Moderne esperanto for begyndere* enhavas 12 numeritajn ĉapitrojn, el kiuj ĉiu surbaze de la antaŭa funkcias kiel "ruĝa gvidlinio" por certigi ordan lernadon. Poste venas enciklopedio "Mi scivolemas!" kiu enhavas listojn kaj informojn pri Esperanto, ĝia gramatiko, la movado kaj ĝia vortprovizo. Fine estas literatura parto kiu enkondukas onin al la abunda literatura mondo de Esperanto per tekstoj diligente elektitaj laŭ (mal)facileco. Tie ekz. eblas legi tekstojn de Claude Piron, aŭ fabelojn de H.C. Andersen paralele en la traduko al Esperanto de Zamenhof kaj la dana originalo.

La libro enhavas 238 paĝojn kaj estas eldonita de Dana Esperanto-Asocio (DEA) nome de Dana Esperantista Junulara Organizo (DEJO). Paro de unu lernolibro kaj unu ekzerclibreto aĉeteblas pere de la libroservo de DEA kontraŭ 175 kr + sendado.

Por pli da informoj pri la libro aŭ por aĉeti ĝin, iru al 100.dejo.dk per via komputilo, aŭ skribu al Mia Nordentoft per mia.nordentoft@dejo.dk. Ankaŭ eblas aĉeti per nia libroservo per retmesaĝo al Ileana Schrøder: libroservo@esperanto.dk.

# Kopenhago

*Konversacia Esperanto-Klubo* regule kunvenas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, lunde je la 19.00 horo en la ĉambro B. Eniru tra la malantaŭa enirejo en la parkejo. Premu butonon sur la dekstra muro por malfermi la pordon aŭ voku 20 27 08 39 aŭ 60 70 79 69.

**12. novembro**

Peter Wraae rakontas pri la siatempa Lyngby Esperanto-Klubo kaj montras gazet-eltondaĵojn pri ĝi. Estas pluraj amuzaj kaj interesaj detaloj.

**19. novembro**

Esperanto-teatro. Ni vidas filmon faritan en 1993 pri Esperanto-teatro, en kiu Kaj Røssum intervjuas Zofia Fornalova. Ana Røssum parolas pri sia forpasinta edzo kaj Tamara parolas pri sia ankaŭ forpasinta patrino.

**26. novembro**

Tio estas mia (esperanta) vivo. Persono ankoraŭ ne elektita.

**3. decembro**

Kion fari en Esperantujo?

La eksterna mondo kredas ke Esperanto estas morta lingvo. Bona okazo esplori la uzeblecojn de nia lingvo, ĉar ĉiusemajne estas Esperanto-aranĝo ie en la mondo. Ni diskutas kiuj aranĝoj estus interesaj por ni se ni havus tempon, monon ktp.

Ni uzas la retejon http://www.eventoj.hu por la venontaj tri monatoj.

**Dimanĉe la 9-an de decembro je la 14-a horo**

Zamenhofa festo, kunlabore kun DEA. Ni skajpos kun la prezidantoj de NEL kaj SEF kaj estos muziko de Michael Branebjerg kaj Jonas Dalmose.

**10. decembro**

Nostalgia vojaĝo. Ni rigardos bildojn el la fotoalbumo de Bodil kaj Gustav Kühlmann kun rimarkoj de Margrethe Noll. (La albumo nun troviĝas en la Esperanto-Muzeo en Vieno.)

# Århus

Kunvenoj de la Esperantoklubo de Århus (informoj: Tobias Nowak, tel. 41 24 40 64) okazas en Folkestedet, Carl Blochs Gade 28, 1., salono 7, je 19.30, unufoje en la monato, vendrede.

**16. novembro**

'Statistiko pri Esperanto'

Svend Nielsen prelegas pri statistikoj: Kiom da homoj vere parolas Esperanton kaj aliaj aferoj.

**14. decembro**

Zamenhofa kaj Kristnaska festo.

# Ålborg

Kunvenoj de Nordjutlanda Esperanto-Klubo (informoj: Ejnar Hjorth, tel. 98 13 40 40) okazas en la vintra sezono (septembro-majo) ĉiumerkrede je la 15-a horo en Christiansgade 38, 1., Aalborg.

# Landa kunveno

La venonta jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio okazos la 27-an kaj la 28-an de Aprilo 2019 en *Severin Kursuscenter*, Skovsvinget 25, 5500 Middelfart.



Pliaj informoj sekvos. Rezervu jam nun la datojn!

# Esperanto estas sukceso ĉe Duolingo!

Nuntempe 700 mil homoj aktive lernas Esperanton per Duolingo, sed ekzistas potencialo por multaj aliaj, ĉar Duolingo estas la plej granda virtuala lingvo-instruilo en la mondo, kun 300 milionoj da lernantoj.

UEA iĝis partnero de Duolingo por enkonduki lernantojn de Duolingo al la loka movado. Ĉiu esperantisto povas iĝi Duolingo-ambasadoro kaj krei eventojn en tiu platformo. Kiam lernanto de via regiono atingas la finon de leciono, tiu vidos Duolingo-reklamon invitante al via evento. En la mondo nun ekzistas 500 Duolingvo-grupoj, el tiuj 60 (12%) en Esperanto.

Eksciu kiel partopreni: https://youtu.be/w8r1JaadL7w

*Emilio Cid*



Bildo el la filmeto ĉe Youtube. Tie jam estas multaj aliaj filmetoj pri Duolingo kaj Esperanto.

# Informado al tradukistoj

Dimanĉe 28.10 okazis en Tel-Avivo kunveno de la Israela Tradukista Asocio (ITA), kiu estis plene dediĉita al Esperanto. Ĝi dauris kvar horojn, kaj partoprenis ĉ. 50 personoj.

Amri Wandel rakontis kio estas Esperanto, kiel ĝi evoluis, kaj kion eblas fari per ĝi, kun aparta emfazo pri literaturo kaj tradukoj. Tali Wandel, lia filino, rakontis pri pri denaskuloj kaj kiel ŝi perceptas la lingvon, kreskinta

kun Esperanto kiel patrolingvo. Sekve ŝi rakontis pri eŭritmio kaj eŭritmia koreografio en Esperanto, kaj prezentis mallongan eŭritmian dancon laŭ originala Esperanto-teksto.




Post la Vespermanĝo mi faris koncizan lecionon de Esperanto, por demonstri kiel lingvo povas esti simpla kaj facila, sed samtempe riĉa, esprimiva kaj fleksebla. Amri invitis la aŭskultantojn viziti la Tel-Avivan klubon, kaj eĉ la Israelan Kongreson en aprilo, post ioma lernado de Esperanto rete aŭ en la porkomencanta kurso en Tel-Avivo, planata por la komenco de 2019. Estis bonaj reagoj, oni aĉetis kelkajn Esperantajn librojn, precipe la Esperanto-tradukon de Amos Oz.

Oni publikigis fotojn kaj reagojn pri la evento en la Facebook-paĝo de la Tradukista Asocio, kiu dum kelkaj tagoj antaŭ la evento afiŝis multe pri Esperanto.



## Informado al medicinistoj



Christoph Klawe, germana neŭrologo kaj aktiva en UMEA (Universala Medicinista Esperanto-Asocio), verkis raporton pri la faka medicina agado en Esperanto por la revuo de *World Medical Association* (WMA, la Monda Medicina Asocio). En ĝi, li sukcesas samtempe informi pri Esperanto ĝenerale, mencii la meritojn de la

UEA, la UNESKO-rezolucion de Montevideo, la apon Amikumu, kaj varbi por Medicina Internacia Revuo.

La 29-an de Oktobro UMEA estis oficiale agnoskita kiel apoganta asocio de la tiel nomata HIFA-reto (vidu la jenan retpaĝon):

www.hifa.org/support/supporting-organisations/universal-medical-esperanto-association

HIFA ("Healthcare Information for All" = sanprizorga informo por ĉiuj) estas reto de internaciaj organizoj, kiu celas disponigi al ĉiuj komunumoj gravajn informojn pri sanprizorgo, nelaste ankaŭ per forigo de lingvaj baroj. Tiel HIFA celas eviti, ke iu ie suferas nur ĉar informoj ne atingas iujn grupojn de la populacio aŭ ne estas disponeblaj en kompreneblaj formoj. Tia agnosko de UMEA fare de HIFA estas inda celebrado de la 110-jara ekzisto de UMEA.

## Reklamu viajn aranĝojn!

INTERNACIA KALENDARO

**KIAM, KIE, KIO OKAZAS? – INTERNACIA KALENDARO** pri Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj, festivaloj:

**http://www.eventoj.hu/2018.htm**

- Vojaĝu al Esperanta renkontiĝo! Serĉu kaj trovu simpatian aranĝon laŭ iliaj priskriboj!
- Se mankas iu aranĝo, anoncu kaj registru ĝin senpage!
- Diskonigu, reklamu la Kalendaron al viaj Esperanto-amikoj!

Bonan vojaĝon, agrablajn travivaĵojn!

*László Szilvási*

# Se vi interesiĝas pri UEA ...

### *Maia, Gobbo kaj de Kock en la novembra malferma tago*

La stabo de la Centra Oficejo kaj la estraro de UEA invitas vizitantojn al la dua Malferma Tago de 2018, kiu okazos jam la 49-an fojon, sabaton, la 17-an de novembro, en la sidejo de UEA ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo.

La Malferman Tagon organizas Saïd Balouchi, flanke de la CO, kaj Fernando Maia, estrarano de UEA pri kulturo kaj kongresoj, flanke de la Estraro. Fernando vojaĝos memstare de Brazilo por labori en la CO semajnon antaŭ la Malferma Tago kaj mem partopreni la eventon.

Krom eventuale aldoniĝontaj prelegantoj, niaj ĉefprelegantoj estos:

- la estrarano de UEA pri kulturo kaj kongresoj, Fernando Maia, per la prelego: “Sed libroj kun homoj: strategia libropolitiko kaj programoj por UEA kaj Esperanto”;
- la universitata profesoro pri lingvistiko kaj Esperanto Federico Gobbo, kiu parolos pri “Esperanto en mezlernejo, ne pro propedeŭtiko, sed pro la interna ideo”;
- kaj la historiisto Ward de Kock, kiu prelegos pri la “Nederlanda Laborista Esperantismo”.

En la programo estos ankaŭ speciala momento por TEJO kaj prezentado de libroservaj novaĵoj. Aldone al specialaj ofertoj, vizitantoj povos profiti de la ĝenerala sesona rabato en la libroservo, butikumi en la bazaro de esperantaĵoj kaj gajni premiojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

# Lahtio 2019

### *La 104-a Universala Kongreso: informkanaloj, reta aliĝilo kaj LKK*

La 104-a UK de Esperanto (20-27 de julio 2019) okazos en la progresema kaj naturamanta finnlanda urbo Lahtio (Lahti). Por trovi oficialajn informojn pri la plej grava Esperanto-evento de 2019, ni invitas vin noti la adreson kaj regule viziti la retpaĝon de la LKK:

www.esperanto.fi/uk2019

Vi povas ankaŭ sekvi la evoluojn rilatajn al la UK ĉe sociaj retejoj:

- oficiala Facebook-paĝo: https://www.facebook.com/Lahtio2019
- oficiala YouTube-kanalo: www.youtube.com/channel/UC0rvzTsk3NtsCcgCqgxc2vA
- Twitter: www.twitter.com/lahtio2019
- Instagram: www.instagram.com/uk2019lahtio
- Esperanto en la regiono de Lahti: www.facebook.com/esperantolahti

Ŝatu, dividu kaj ne timu marki viajn afiŝojn, pensojn, atendojn kaj ankaŭ demandojn uzante la kradvorton #Lahtio2019 – ni antaŭfestu nian 104-an UK-on! Por komenci, kial ne spekti tiun simpatian bonvenigan filmon de niaj organizantoj: http://youtu.be/5EFOVs-PDkg – Jes, bonvenon al Lahtio!

Aliĝu nun!




La 104-a UK akceptis la unuajn aliĝojn jam dum la 103-a UK en Lisbono, per papera aliĝilo en la kongresa sako. La aliĝnumero 1 estas rezervita al la gajninto de la kongresa aŭkcio. Nun la tuta mondo povas plej facile kaj naturamike aliĝi per la reta aliĝilo: uea.org/alighoj/uk_alighilo

Atentu kaj atentigu viajn konatojn: la plej favorpreza aliĝperiodo daŭros

ĝis la 31-a de decembro 2018. La kotiztabelon vi povas trovi ĉe la retpaĝo de UEA: uea.org/alighoj/uk_kotiztabelo

Fine ne forgesu, ke plej multe ŝparas la individuaj membroj de UEA kaj TEJO, ĉu bazaj aŭ abonantoj. Do nepre (re)aliĝu por ne mistrafi la plej favoran kotizon: uea.org/alighoj/alighilo2019

**La Loka Kongresa Komitato**

La finnlanda LKK, aprobita de la Estraro de UEA, jam plene laboras por malfermi al ni, esperantistoj, sian simpatian urbon kaj landon:

- prezidanto: Tuomo Grundström
- vicprezidanto, kongresejo: Päivi Saarinen
- ĝenerala sekretario, volontuloj: Tiina Kosunen
- ekskursoj: Tiina Oittinen
- arta kunordiganto, kasisto: Paula Niinikorpi
- informado: Jukka Pietiläinen
- junulara programo, reta informado: Larissa Phileas
- membro, blindulaj aferoj: Börje Eriksson
- membro, Lahti-aferoj: Synnöve Mynttinen
- membro, IIK-aferoj: Sigrid Kivistö

De la 14-a ĝis la 16-a de septembro dum la tradiciaj Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando okazis jam la dua kongresprepara trejn-seminario. Partoprenis ĝin kvindeko da aktivuloj kaj la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, Clay Magalhães, kiu traktis kun oficistoj de la urbo organizajn aferojn rilatajn al la UK. Ni aldone informas, ke de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro delegacio de UEA, gvidota de Fernando Maia Jr., estrarano pri kongresoj, vizitos Lahtion laŭ invito de la urbaj instancoj por labori pri nia UK kune kun la LKK.

Kaj ne forgesu: ĉiuj – individuoj, Landaj Asocioj, kluboj, organizantoj de eventoj ktp. – povas mendi la Unuan Bultenon kaj paperan aliĝilon ĉe la CO de UEA. Bv. mencii la kvanton bezonatan de tiuj materialoj en la mendo, sendota al sekretario@co.uea.org aŭ letere al la adreso de la CO: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

*[gaz kom uea 762]*

# Progreso en Ĉinio

***La unua studentaro de esperanta fako estas akceptita de Zaozhuang-a Universitato***

Tra aprobo de Mnisterio pri Edukado, danke al subteno de Ĉina Esperanto-Ligo, Zaozhuang-a Universitato komencis varbi studentojn de 4-jara regula kurso de esperanta fako de 2018. Ĉiuj 25 studentoj de la esperanta fako en la unua jaro 2018 jam venis el la tuta provinco Shandong kaj aliĝis en la 8-a kaj 9-a de septembro. Post la aliĝo ili tuj komencis partopreni en severa milita trejnado.



Junulara Esperanto-Asocio de Zaozhuang-a Universitato partoprenis en bonveniga aktivado de novaj studentoj, kaj vizitis la novan klason de esperanto kaj prezentis Esperantan movadon. En la 14-a de septembro, la klaso vizitis Esperanto-Muzeon. Komprenante bazon de Esperanto, ili diras, ke ili lernu Esperanton bone kaj klopodu fariĝi esperantistoj de nova epoko.

# 50-jara jubileo de ESF

En la fermo de la UK en Lisbono, UEA speciale honorigis la usonan fondaĵon ESF pro 50 jaroj da elstara agado. Fondita en 1968, ESF (en la angla: Esperantic Studies Foundation) celas antaŭenigi lingvan justecon kaj lingvan komunikadon, kun speciala atento al Esperanto. Pro ĝiaj grandaj kontribuoj al la movado, precipe dum la lastaj dudek jaroj, la Prezidanto de UEA petis la ĉeestantajn estraranojn kaj kunlaborantojn de ESF veni sur la podion por ricevi la aplaŭdojn de la publiko.

Dum tridek jaroj post ĝia fondo, la rimedoj kaj agado de ESF iom post iom kreskis, danke al donacoj kaj heredaĵoj de diversaj esperantistoj. Ekde la jaro 2000, pro heredaĵo de esperantista paro Bill kaj Cathy Schulze, ĝi komencis pli grandskalan aktivecon ankaŭ sur la tereno de lernado kaj instruado de Esperanto. Ĝi financis centojn da diversaj projektoj, interalie

- ellaboron de la edukaj retejoj lernu.net kaj edukado.net,
- kreon de skriba korpuso de Esperanto: tekstaro.com,
- plurajn Nitobe-simpoziojn (plej lasta el kiuj okazis ĉi-jare en Lisbono),

- kreon de la dokumentfilmo “The Universal Language” kaj la videokurso “Esperanto – Pasporto al la Tuta Mondo” (havebla plene ĉe YouTube),
- starigon de Esperanto-ekzamenoj laŭ la KER (Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj),
- kaj de CED-fonduso por subteni studojn pri Esperanto kaj interlingvistiko.

ESF daŭre subtenas la postdiplomajn studojn pri interlingvistiko kaj esperantologio en Poznano, NASK – Nord-Amerikan Someran Kursaron – altnivelajn studojn de Esperanto en Usono, donas plurajn stipendojn al esploristoj por esploroj kaj publikigo, kaj subtenas la laboron de la redaktorino de Edukado.net per ĉiumonata honorario.

Trezoro Huang Yinbao, UEA-estrarano kaj la redaktoro de la Esperanta eldono de Unesko-kuriero, speciale dankis al ESF pro la subteno de kernaj agadoj kaj servoj de UEA, kiel la Biblioteko Hodler, la Katedro pri Esperanto kaj Interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdamo, kaj Unesko-kuriero mem. Trezoro menciis, ke UEA plurfoje donis Diplomojn pro Elstara Agado al projektoj kaj homoj, kiujn ESF finance subtenis. “Hodiaŭ ni volas honori la fondaĵon mem, kiu donis la bazon por tiom da valoraj projektoj. La literoj ESF povas havi multajn signifojn. Mi proponas, ke plej trafe, ESF devas signifi ‘Elstare Sukcesa Financado’.”

Humphrey Tonkin, kunfondinto kaj la nuna prezidanto de ESF, rimarkis, ke zorga kaj konservema traktado de la financaj rimedoj ebligis, ke hodiaŭ per la fruktoj de tiu kapitalo, ESF povas disdoni preskaŭ kvaronmilionon da dolaroj en diversspecaj subvencioj ĉiujare. Li ankaŭ rimarkis ke ĝuste nun, sojle al la 75-jara datreveno de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, la demando pri lingva justeco fariĝas pli kaj pli brula. D-ro Tonkin substrekis, ke la sukceso de ESF ne estus ebla sen la kapitalo malantaŭ ĝi, kaj invitis la ĉeestantojn subteni per donacoj kaj UEA-n, kaj ESF-on, kaj ideale ambaŭ, “ĉar mono ebligas sukceson. Do, al la venontaj 150 jaroj da sukceso!”


La honorigo estas spektebla ĉe la Facebook-paĝo de ESF: www.facebook.com/pg/esperantic/videos. Por trovi pliajn informojn, ekscii pri la eventualaj subvencioj por via projekto, fari donacojn ktp., bv. viziti la retejon de ESF: www.esperantic.org (legu la aktualan jarraporton de ESF).

*[Gaz kom uea 751]*

# Raportoj el Japanio

## La 23-an de septembro 2018

*Danĝerego de la nuklea centralo Tomari*




### Granda tertremo okazis

Je la 3-a kaj 8 minutoj la 9-an de septembro okazis granda tertremo en la suda parto de Hokajdo.

En Japanio ofte okazas tertremoj. La registaro kaj sismologoj esploras, kie estas aktivaj faŭltoj, kaj faras mapon pri tiuj, sed tiu ĉi tertremo okazis, ne laŭ tiuj konataj faŭltoj, sed laŭ nekonata faŭlto. Tio signifas, ke estas multegaj nekonataj faŭltoj en la japana insularo, sekve ĉie povos okazi grandaj tertremoj.

Mi vidis en televido la damaĝojn, kaj mi tre surpriziĝis pro nekredebla nombro da terfaloj kaŭzitaj de la tertremo. Ĉiuj montoj estis kvazaŭ skrapitaj per grandegaj ungoj (vidu la foton). Vulkana cindro, kiu kovris la montojn, subenglitis pro la tremegoj kaj mortigis ĉirkaŭ 40 homojn, detruante iliajn domojn. Tio estas problemo ne nur de Hokajdo, ĉar Japanio estas vulkana insularo kaj ĉie estas similaj terenaj formoj.



*Terglitoj okazis en multaj lokoj.*



Alia surprizo estis, ke okazis terlikviĝoj en la ĉefurbo Sapporo 50 kilometrojn for de la epicentro. Tie, pro la aktiviĝinta subtera akvo vojo sinkis kaj domoj kliniĝis.

La tertremo kaŭzis alian grandan problemon. Tio estas paneo de tri hidroelektraj generatoroj de la elektra kompanio Hokajdo (mallongigita nomo, Hokuden) en la urbo Acuma, sub kiu okazis la tertremo. Tiu centralo liveris duonon de la bezonata elektro en Hokajdo. La paneo influis aliajn malgrandajn generatorojn, kaj sekve ĉiuj generatoroj de Hokuden haltis. En la moderna vivo homoj ne povas vivi sen elektro. Fabrikoj ne povis funkcii, bovistoj ne povis melki, sekve bovinoj mortis pro mammalsano, hospitaloj ne povis kuraci malsanulojn, resume ĉiuj funkcioj haltis kaj la ekonomio suferas multe. Eĉ nun elektra liverado ne estas sufiĉa kaj ne stabila, do la loĝantoj vivas en maltrankvilo.

Ankaŭ la nuklea centralo Tomari, kiun Hokuden posedas, suferis, perdinte la tutan elektran fonton el ekstere kaj dume ĝi devis dependi de memproduktita elektro. Feliĉe, tiam ĉiuj reaktoroj ne funkciis pro ekzamenado. Se ili estus funkciantaj, tio kaŭzus denove grandan nuklean katastrofon.



*La nuklea centralo Tomari*

**En la nuklea centralo Tomari estas tri nukleaj reaktoroj:**

| | Sistemo | Ekfunkcio | Produktkvanto | Nuna stato |
|---|---|---|---|---|
| N-ro 1 | PWA | 1989.6.22 | 579 mil kW | ekzamenata |
| N-ro 2 | PWA | 1991.4.12 | 579 mil kW | ekzamenata |
| N-ro 3 | PWA | 2009.12.22 | 912 mil kW | ekzamenata |

PWA = premakva reaktoro. La nukleaj reaktoroj de Fukuŝima estas de alia tipo.

**Mia amiko pledos en la tribunalo**

Kontraŭ ĉiuj nukleaj centraloj en Japanio estas protestaj agadoj. Ankaŭ en Hokajdo estas movado kontraŭ la nuklea centralo Tomari kaj oni akuzas Hokuden-on, postulante forĵeton de tiu centralo. Mia konato, s-ino Higuĉi Minako, kiu agadas dekomence kontraŭ tiu centralo, pledos en la tribunalo Hokajdo la 9-an de oktobro. Ŝi sendis al mi informon pri tio kaj ankaŭ la tekston por ŝia pledado. Ŝi prezentas sin jene:

**Teksto de ŝia parolado en la tribunalo**

Mia nomo estas Higuĉi Minako. Mi respondecis pri la informilo de "Societo agadanta por forĵeti la nuklean centralon Tomari" ekde junio 2011 ĝis junio tiun ĉi jaron.

Kiam ni decidis meti la kazon en la tribunalon, ne estis sufiĉe da kunlaborantoj, do mi kaj aliaj du laboris per telefono kaj retmesaĝoj por tiu laboro. Kiam ni sukcesis kolekti 612 homojn kiel akuzantojn, mi estis tre ĝoja. Nun ni havas 1233 akuzantojn.

Mi neniam forgesas la akcidenton en Ĉernobil en 1996. Eĉ en fora Hokajdo falis nukleaĵoj. Kelkajn tagojn post la akcidento mi naskis la unuan bebon. Por protekti ĝin kaj nin, kiel zorge mi elektis manĝaĵojn! Por disvastigi informon pri la danĝero de la nuklea akcidento, mi komencis eldoni etan informilon "Ginga Cuuŝin » (Informilo Galaksio), kaj tiun ĉi jaron estas la 30-jariĝo de la informilo.

Mi ne estas sperta en publika parolado, sed kiel unu el tiuj, kiuj spertis la ĉi-fojan senelektran, tute malluman vivon, mi parolos pri la temo "La ĉi-foja tertremo en Hokajdo igis pli klara la danĝeron de la nuklea centralo

Tomari”. Ĉiuj povos ĉeesti ĉe la juĝado. Mi atendas vian ĉeeston.

**La ĉi-foja tertremo en Hokajdo igis pli klara la danĝeron de la nuklea centralo Tomari.**

*Akuzanto Higuĉi Minako*

Frumatene la 6-an de septembro okazis tertremo kun sisma intenso 7 (magnitudo 6,7) en la orienta distrikto de Iburi, kaj la elektra kompanio Hokajdo (Hokuden) perdis funkcion liveri elektron en la tuta Hokajdo. Mi loĝas en la urbo Ebecu, 60 kilometrojn for de la epicentro Acuma, sed al mia domo ne venis elektro dum du tagoj. Trafiko ne funkciis. Vendejoj estis fermitaj. Ni ne povis aĉeti manĝaĵojn. Informoj venis nur per radio-aparato, kiu apenaŭ funkciis per baterio. Mi unuan fojon spertis teruron de tute mallumaj stratoj sen trafikaj signaloj. Ĉi-foje mi parolos nur pri tio, kion mi rimarkis en tiuj mallumaj noktoj.

Pro la tertremo hidroelektraj generatoroj n-ro 2 (600 mil kW) kaj n-ro 4 (700 mil kW) de Hokuden ĉesis funkcii pro damaĝoj al tuboj, kiuj transportas varmegan vaporon. Kaj post 17 minutoj la generatoro n-ro 1 (350 mil kW) ĉesis funkcii. Pro tio perdiĝis duono de la bezonata elektro en Hokajdo, kaj perdiĝis ankaŭ ekvilibro inter la aliaj generatoroj, sekve okazis tuta senlumiĝo en la tuta insulo Hokajdo. La generatoro n-ro 3 jam antaŭe estis forĵetita.

Nukleaj reaktoroj, tiutempe ne funkciantaj, en la nuklea centralo Tomari, perdis elektron venintan el ekstere dum 19 horoj kaj duono. Dume urĝ-okazaj generatoroj funkciis kaj malvarmigis nukleajn brulaĵojn en la akvujoj. Se tiuj generatoroj paneus, tiuj brulaĵoj povus fariĝi krizaj.

En tiu tertremo sisma intenso en Tomari estis nur 2. Eble Hokuden antaŭvidis eventualan grandan tertremon, kiu povus perdigi eleksteran elektron, sed ĝi tute ne antaŭvidis, ke pro tertremo fore okazonta kaŭzos senelektriĝo en tuta Hokajdo, nek ke la nuklea centralo perdos eleksteran elektron dum multaj horoj. Hokuden pledadis en tiu tribunalo, ke ĝi prenas/is ĉiajn rimedojn kontraŭ ĉiaj danĝeroj por gardi la reaktorojn, sed ĝi tute ne antaŭvidis, ke la elekstera elektro tiel facile perdiĝos.

Se la nukleaj reaktoroj funkcius tiutempe, kio okazus? Malvarmigi uzitajn brulaĵojn en akvujoj kaj malvarmigi funkciantajn reaktorojn estas tute malsame. Antaŭ sep jaroj, pro la granda cunamo en Fukuŝima, kvar reaktoroj sinsekve perdis elektran fonton kaj detruiĝis, disĵetante nukleaĵojn en la orienta Japanio. Fukuŝima-anoj perdis trankvilan vivon. Ĉu ili reakiris la

trankvilan vivon? Ankoraŭ la akcidento ne finiĝis. Spertinte senelektran vivon, mi forte konstatis, ke ni ne povas vivi sekure kaj trankvile kun nukleaj centraloj.

La due grava afero dum tiu ĉi tertrema katastrofo estas, ke oni havis 17 minutojn inter la paneoj de la dua kaj la kvara generatoroj kaj tiu de la unua generatoro. Multaj esploristoj menciis, ke Hokuden povus eviti tutan senelektriĝon, se ĝi ekvilibrigus ofertadon kaj mendadon de elektro, malfunkciigante generatrojn en aliaj lokoj. La kompanio tute ne estis preta je krizaj okazoj. Ĝi ne havas kapablon teni la nukleajn centralojn sekuraj. Tio fariĝis tute klara al ĉiuj, okaze de la ĉi-foja tertremo.

La tria grava afero estas, ke la ĉi-foja tertremo okazis en ne antaŭvidata loko. Ĝi okazis 37 kilometrojn profunde kaj kaŭzis grandegajn terfalojn. En la maro apud la nuklea centralo Tomari troviĝas simila faŭlto kiel tiu en la urbo Acuma. Se okazos tertremo apud Tomari, ĝi trafos la nuklean centralon, kaj donos grandan damaĝon al ĝi, rompante tubojn per vertikalaj tremetoj.

Fine mi legos parton de mia eseo, kiu aperis en la libro "Leteroj al Hokuden" antaŭ 29 jaroj.

> Se okazos nuklea akcidento en Tomari, la unuaj viktimoj estos infanoj. Tia akcidento malpurigos la maron, la aeron kaj la teron, kaj tra poluitaj manĝaĵoj radioaktiveco akumuliĝos en iliaj korpoj.
>
> Mi iam vizitis la vilaĝon Tomari. Tie estis tre bela marbordo. Kial oni tie konstruis la nuklean centralon? Mi rememoris la golfon Ŝiranui en la gubernio Kumamoto. Tie estis bela kaj fekunda maro. En tiun maron la nitrogena fabriko forĵetis venenan hidrargon. Tiu ne estas videbla, nek flarebla, same kiel radioaktivaĵo, tial la loĝantoj, tute ne rimarkante la danĝeron, manĝadis poluitajn fiŝojn, kaj suferis pro malsano nomata "Minamata malsano". Eĉ beboj naskiĝis malsanaj. … Vi forĵetu la nuklean centralon Tomari, se vi amas vian familion.

Se la nuklea centralo funkcius, kiam okazis la tertremo, povus okazi granda akcidento. Mi postulas, ke la danĝera nuklea centralo Tomari estu tuj forĵetita. Mi esperas, ke la juĝistaro verku ĝustan verdikton.

(Fino de la pled-teksto)

Kiam mi aŭdis, ke la ekstera elektro perdiĝis, mi tre timis. Certe la nuklea centralo havas sian propran generatoron por produkti elektron, sed por tio

oni bezonas benzinon aŭ pezan oleon. Ĉu Hokuden havas sufiĉe da rezervo? Kiom da tagoj ĝi povos produktadi elektron?

Kaj alia timo estas, ke tertremoj povas rompi tubojn en la centralo. Nukleaj reaktoroj estas ligitaj per multege da grandaj kaj malgrandaj tuboj. Se tiuj estos rompitaj, okazos katastrofo. Post grandaj tertremoj oni ofte trovas grandajn fendojn sur la tero (vidu la fotojn). Se tia fendo okazos sub la nuklea centralo, nukleaj reaktoroj ne povos rezisti. Kaj tian akcidenton ni jam spertis en la nuklea centralo Kaŝiŭazaki-Kariŭa en la gubenrio Niigata en julio 2007.



*Maldekstre: fendo sur rizkampo kaŭzita de la tertremo en Kumamoto en 2016. Dekstre: detruita tereno en la nuklea centralo Kaŝiŭazaki-Kariŭa en Niigata kaŭzita de la tertremo en 2007. TEPCO riparas ĝin kaj provas refunkciigi tiun difektitan centralon.*

Ĉiuj timas eventualan nuklean akcidenton, sed la registaro kaj la industria mondo persiste provas funkciigi ĉiujn nukleajn reaktorojn. Kiam okazas grandaj tertremoj, la unua demando aperanta en la kapo de multaj homoj estas “Ĉu la nuklea centralo ne estis difektita? » Ni ne plu volas vivi kun tiu timo.

### La 1-an de oktobro 2018

### Tamaki Denny venkis en la elekto en Okinavo

La 30an de septembro okazis balotado por elekti la guberniestron de Okinavo, kaj venkis s-ro Tamaki Denny, kiu klare kaj forte kontraŭas la konstruadon de la nova granda usona militbazo Henoko. Tio estas grandega ĝojo kaj kuraĝigo por multaj homoj, kiuj batalas kontraŭ la diktatora, maldemokratia politiko de la nuna ĉefministro Abe.

**Okinavo ĝis la fino de la dua mondmilito**

Okinavo estis sendependa reĝlando nomata Rjuukjuu, prospera pro internacia komerco inter Japanio kaj Ĉinio, sed en 1609 ĝi estis koloniita de la feŭdestro de Sacuma de la suda insulo Kjuuŝuu. En 1868 la malnova feŭdisma reĝimo Tokugaŭa estis anstataŭigita de la registaro de Meiĵi kaj Japanio ekpaŝis laŭ la modelo de eŭropaj landoj. En 1879 la nova registaro abolis la kolonian staton de Okinavo kaj igis ĝin gubernio de Japanio.

En marto 1945, okazis batalo en la insulo Okinavo. La militisma registaro, volante pluvivigi la tennoisman (imperiestran) reĝimon, viktimigis Okinavon por havi pli da tempo por nogoci pri tio, tial okazis kruela batalo. La usona armeo bombardis la insulon de la maro kaj de la aero, kion oni nomas “fera uragano”, tiel ke nenie restis verdaĵoj en la batalejoj.

La registaro ne esploris pri la nombro de viktimoj en tiu batalo. Laŭ la gubernia esploro:

| Japanaj viktimoj | 188 136 |
|---|---|
| A: soldatoj el ekster Okinavo | 65 908 |
| B: soldatoj el Okinavo | 28 228 |
| C: okinavanoj laborantaj kun la japana armeo | 55 246 |
| D: loĝantoj | 38 754 |

Sur la Cenotafo Iŝiĵi estas enskribitaj 240 383 nomoj, kiuj mortis pro la militoj ekde 1931 ĝis 1946. Inter ili estas 149 035 okinavaj loĝantoj kaj 20 195 usonaj soldatoj kaj 85 britaj soldatoj. La nombro de la viktimoj diferencas laŭ esploroj, sed estas certe, ke pli ol 200 000 homoj mortis en la batalo de Okinavo, kiun okazigis la japana armeo por pluvivigi la tennoisman reĝimon.

**La insulo de usonaj militbazoj**





Post la milito Usono okupis la insularon kiel sian militbazon kaj establis la pupregistaron de Okinavo. Dum tiu periodo la loĝantoj devis uzi usonajn dolarojn anstataŭ japanajn jenojn kaj devis peti vizon, kiam ili vizitis Japanion. (Foto: poŝtmarko kun prezo de 3 cendoj)

Poste okazis la Korea Milito (en 1950) kaj la Vjetnama Milito (Usono ekbatalis en 1954 anstataŭ Francio ĝis 1975), kaj tuta Okinavo, kaj ankaŭ Japanio, ludis gravan rolon kiel militbazoj de Usono. Usonaj soldatoj ekiris de Okinavo kaj Japanio al tiuj landoj kaj revenis vivaj aŭ mortaj. Mortintaj soldatoj, purigite, revenis al Usono.

Vivantaj soldatoj amuzis sin, uzante multe da mono en amuzkvartaloj. Ili estis senesperaj, ne sciante sian estontecon, tial okazis teruraj krimoj. Ankaŭ revenis difektitaj armiloj kiel tankoj por esti riparitaj. Kaj tio ripetiĝis malgrandskale ankaŭ okaze de la militoj en Afganio kaj Irako.

Usonaj militbazoj funkcias ne por defendo de Japanio, sed por eksterlandaj militoj. Okinavo situas en tre oportuna loko inter Japanio, Koreio, Filipinio, Ĉinio, kie povos okazi konfliktoj. Tial Okinavo havas ŝlosilan rolon por la usona mondstrategio.




Eĉ post kiam Okinavo estis redonita al Japanio en 1972, situacio ne multe ŝanĝiĝis. Revenonte al Japanio, ĝi volis havi protekton de la japana konstitucio, kaj sukcesis denove unuiĝi. Ĝi klopodis asimiliĝi al Japanio, sed ĝi estas plu diskriminaciata kaj viktimigita de Japanio. Ĝia revo tute ne estas plenumita.



Nun en tiu malgranda insularo Okinavo troviĝas 70% de la usonaj militbazoj ekzistantaj en Japanio, sekve okazas diversaj akcidentoj kaj krimoj. Dum la pasintaj du jaroj Osprej (foto) falis en la maron de Okinavo, ekipaĵoj de helikopteroj falis en lernejon kaj infanĝardenon, junulino estis mortigita de usona soldato ... kaj la loĝantoj estas tagnokte ĝenataj de bruegoj el usonaj aviadiloj kaj helikopteroj.

La gubernio de Okinavo protestas al Usono kaj al la japana registaro, sed vane. Usono tuj poste rekomencas ekzercadon de Osprej-oj aŭ helikopteroj, kaj ĝi ordonas, ke la soldatoj ne faru tian aĉan agon, sed baldaŭ okazas similaj krimoj kaj akcidentoj.

Kiam okazas tiuj aferoj, la japana polico ne havas rajton aresti la krimulojn. La japana registaro ŝajne protestas, sed nur buŝe kaj peteme. Pro tio foje eksplodis koleregо de okinavanoj kaj okazis grandaj manifestacioj kaj kunvenoj, eĉ perfortaj kontraŭbataloj, sed preskaŭ nenio ŝanĝiĝis.

**Konstruado de nova militbazo Henoko**



En la sudo de Okinavo estas granda aerodromo Futenma. Ĝi situas en la mezo de la urbo Ginoŭan, kaj ĉirkaŭ ĝi estas loĝkvartaloj (vidu la foton), tial ĝi estas nomata "plej danĝera militbazo en la mondo".

Post la milito Usono forpelis loĝantojn el iliaj domoj kaj kampoj per bajonetoj kaj buldozoj kaj konstruis la bazon. Reakiri la rabitajn terenojn estas volo de la eksaj terposedantoj kaj de la okinavanoj, kaj la registaro ŝajne klopodis por tio.

Kion faris la registaro?





Ĝi proponis, ke anstataŭ la redonota aerodromo Futenma, ĝi konstruu novan militbazon en la maro de Henoko.

Usono akceptis tiun proponon. Tiu nova bazo estos ne simple nova, sed ankaŭ la plej moderna.

Se tiu bazo estos konstruita, Okinavo devos

esti preskaŭ eterne militbazo de Usono. Ĉu tio estas akceptebla por la okinavanoj? Kial nur Okinavo devos suferi pro tiom multe da militbazoj tiom longe?




Por komenci la konstruadon de Henoko-militbazo, la registaro devis ricevi permeson de la guberniestro de Okinavo. Tiama guberniestro Nakaima, kiu ŝajne kontraŭis la konstruadon, subite aprobis ĝin en la lastaj tagoj de sia mandatperiodo. Li perfidis la okinavanojn. Okazis elekto de nova guberniestro en oktobro 2014.

## Aperis s-ro Onaga



Ĝis tiam s-ro Onaga Takeŝi (foto) estis estro de la ĉefurbo Naha el Liberala Demokratia Partio (LDP). Tiu partio regas Japanion kaj taksas plej grava la rilaton kun Usono kaj antaŭenigis la konstruadon en Henoko. Kvankam Onaga apartenis al tiu partio, li kontraŭis ĝin. Li kandidatiĝis al la elekto, promesante, ke li ĉesigos la konstruadon. Lin subtenis ribelantoj el la LDP-anoj, multaj industriistoj kaj eĉ maldekstraj partioj inkluzive de Japana Komunista Partio, krom kompreneble multaj okinavanoj. La rezulto estis granda venko

de Onaga kontraŭ tiu perfida Nakaima. Poste en 2017 okazis ĝenerala elekto de deputitoj kaj 3 el 4 elektitoj el Okinavo estis kontrŭantoj de la konstruado. Tiamaniere Okinavo klare montradis sian malvolon al la militbazo Henoko.

Dume Onaga ĉiam pledis, ke identeco de la okinavanoj estas pli grava ol ideologio. Antaŭ li, dekstruloj (LDP kaj ĝiaj subtenantoj) kaj maldekstruloj (Demokratia Partio, Japana Komunista Partio kaj ĝiaj subtenantoj) ĉiam interbatalis kaj malhelpis kunlaboron por bonigi la plej malriĉan gubernion Okinavo. Onaga volis haltigi tiun interbatalon per la vorto “identeco”. Historie Okinavo estis kolonio de Japanio, batalejo inter Japanio kaj Usono, kolonio de Usono dum 27 jaroj, kaj eĉ poste ĝi suferis pro usonaj militbazoj kaj malriĉeco. Li provis solvi la problemon per tiu vorto “identeco”, nome fiero de posteuloj de la glora reĝlando Rjuukjuu. Li demandis ilin, ĉu ili povos akcepti la novan militbazon, simbolon de subpremo de fortuloj, kiel *uĉinanĉuu*, okinavanoj.

Tamen tio estis tre maloportuna por la registaro. Ĝi prenis/as ĉiajn aĉajn rimedojn por malfortigi liajn forton kaj influon. Ĝi malmultigis subvencion al Okinavo kaj provis sufoki lin finance. En elektoj de aliaj urboj en Okinavo ĝi promesis subvencion, kondiĉe, ke venkos kandidatoj subtenantaj la konstruadon. Dum kvar jaroj Onaga laboris multege en tiaj kontraŭaj ventoj, kaj fine suferis pro kancero. Kelkajn tagojn antaŭ la morto (la 8-an de aŭgusto en la aĝo de 67 jaroj), li decidis nuligi permeson de la konstruado, kiun aprobis la eksa guberniestro Nakaima en oktobro 2014. Li batalis kaj batalis, kaj falis meze de sia vojo.

**Tamaki Denny kandidatiĝis**

La morto de s-ro Onaga donis grandan ŝokon al la progresema flanko, kaj male, certe la registaro kaj LDP opiniis, ke bona ŝanco venis al ili. Ili kandidatigis s-ron Sakima, tiaman urbestron de Ginoŭan. Estas malfacile por la progresema flanko trovi bonan heredanton de s-ro Onaga, sed oni trovis, ke en lia letero estis skribita la nomo de Tamaki Denny kiel lia heredanto, tiutempe unu el la tri deputitoj el Okinavo, kiuj kontraŭas la konstruadon. Kiam li sciis tiun volon de s-ro Onaga, li decidis kandidatiĝi. Li parolis al la publiko en la insulo Ieĵima la 13an de oktobro, kiam komenciĝis la elekta kampanjo:

> S-ro Onaga ĉiam pledis, ke pli grava estas identeco, ol ideologio. Identeco signifas lokon, sur kiu homoj staras kaj en kiu ili povas

trankvile resti. Mi elektis la insulon Ieĵima kiel la unua loko de mia elekta kampanjo, ĉar mi naskiĝis en tiu ĉi insulo. Mia patrino kreskis en malriĉa familio kaj post la milito spertis vivon kiel kaptito. Ŝi poste laboris kaj renkontis usonan soldaton, naskis min kaj nutris min. Tiu ĉi insulo estas la loko, kie mia identeco komenciĝis.

(Lia patro malaperis, do li estis vartita nur de sia patrino. La patro estas usonano, tial li havas usonan nomon Denny.)

Alia identeco estas tiu de Okinavo. Same kiel mi ne perdas identecon de Ieĵima, ĉiuj havas sian identecon, kaj kiel loĝantoj en Okinavo ĉiuj havas identecon de Okinavo. Protekti nian identecon estas protekti tiun belan naturon. La alia identeco estas historio de "Tutinsula batalo" okazinta en 1956, dum la kolonia periodo de Okinavo, pri la rabitaj terenoj.

Ni akcelos ekonomian, kulturan kaj homan rilaton kun eksterlando, kaj dume ni trovu solvon pri la problemoj de la militbazoj. Ne per forto, sed per amikiĝo, Okinavo rilatu al eksterlando. Okinavo estu la ĉefrolanto, por ke Japanio brilu inter aziaj landoj.



En la maldekstra foto, s-ro Tamaki ĝoje dancas okinavan dancon "kaĉaaŝii" en okinava ĉemizo "karijuŝi", eksciinte sian venkon. Dum la kampanjo li ofte uzis okinavan dialekton "uĉinaaguĉi". Laŭ lingvistoj ĝi apartenas al la japana lingvo, sed por homoj ekster Okinavo ĝi estas tute ne komprenebla.

Okinavanoj nomas sin "uĉinaanĉu" kaj japanojn ekster Okinavo "jamatonĉu". Tia kutimo tute ne ekzistas en aliaj regionoj de Japanio. Tamaki, parolante en "uĉinaaguĉi", vestante sin per "karijuŝi" kaj dancante "kaĉaaŝii", volis revivigi fieron de "uĉinaanĉu".

## Granda venko de s-ro Tamaki

S-ron Asama tre forte subtenis la regantaj partioj LDP kaj Koomei, sendante multajn gravulojn al Okinavo. Asama kaj LDP timis malvenkon pro la problemo de Henoko, tial ili kaŝis la temon kaj nur parolis pri ekonomio kaj subvencio de la registaro, sed tio male efikis. Okinavanoj sentis, ke ili estas mokitaj de tiuj gravuloj el LDP kaj de la artifiko de "dolĉaĵo kaj vipo" donotaj de la registaro, kaj des pli subtenis s-ron Tamaki. La rezulto estis granda venko de s-ro Tamaki. Li akiris la plej multajn voĉojn en la historio de guberniestraj elektoj.

| | |
|---|---|
| Tamaki Denny | 396 632 voĉoj (55,07%) |
| Asama Acuŝi | 316 458 voĉoj (43,94%) |

Kvankam Okinavo klare montris sian malvolon al la konstruado de la militbazo Henoko, la registaro certe ne rezignos, dirante, ke la nova militbazo estas la unusola rimedo por solvi la problemon de la danĝera aerodromo Futenma. Ĝi ruze uzos ĉiajn rimedojn por renversi opinion de Okinavo per mono kaj minaco, kaj renversi ankaŭ ĝeneralan opinion de japanoj per falsaj informoj, do daŭros la batalo de Okinavo kaj ankaŭ de ni. Dum la pasintaj jaroj ofte malvenkis niaj movadoj, temante pri Henoko, nuklea politiko kaj militaj leĝoj. Se ni malvenkus en Okinavo, ni perdus energion plu batali,do la venko en Okinavo estas gravega por la demokratia movado. Nia sekva celo estas forpelo de la ĉefministro Abe, kiu tute ne aŭskultas voĉojn de la popolanoj, en la venonta ĝenerala elekto de konsilianoj.


## Rememoro de mia eksa studentino

Kiam mi laboris kiel instruisto en universitato, estis studentino el Okinavo en mia klaso. Mi demandis ŝin, ĉu ŝi sentas sin kiel okinavano aŭ japano. Ŝi respondis, "Mi estas okinavano. 60% el miaj samklasanoj en supera mezlernejo en Okinavo sentas sin kiel okinavanoj". Post la universitata studo ŝi translokiĝis en la gubernion Nagano en la mezo de Honŝuu-insulo por edziniĝi al sia samklasano en universitato. Kiam mi pensas pri Okinavo, unue venas ŝia figuro en mia kapo. Certe ŝi estas ĝoja pro la venko de s-ro Tamaki kaj dancis "kaĉaaŝii" kun siaj gefiloj.

*HORI Jasuo*




Informisto kaj informilaro: Peter Wraae
en komerca altlernejo rapidlecionis pri Esperanto




Ĉu vi jam legis iun el la multaj interesaj artikoloj de Unesko-kuriero, pri kiu ni parolis pasintnumere? Se ne, tuj iru al uea.org/revuoj/unesko_kuriero (kaj se jes, vi rajtas iri tien denove). Ankaŭ eblas aĉeti la unuopajn numerojn ĉe la Libroservo de UEA.